

## KREDO KAJ SCIENCO

Foje mi vizitis deĵore unu sinjorinon, kiun mi inteligentan, ĝenerale kleran ĉiam traktis. Pri traktinte gravajn fakajn problemojn, la diskuto glitis al ĝeneralaj temoj.

“Mia kunlaborantino Zuska sabate edziniĝas, kaj imagu, ŝi iros ankaŭ en preĝejon! Verŝajne ŝi ankoraŭ kredas je Dio! Mi ne komprenas homojn, kiuj ankoraŭ hodiaŭ kredas je Dio, verŝajne temas nur pri naivuloj!”

Tiun ĉi rimarkon mi ne povis toleri sen reago: “Kara sinjorino, ne nur Zuska, sed mi ekkonis multajn inteligentulojn, alt-lernejajn profesorojn kaj docentojn, kiuj vizitadis regule preĝejon, aŭ kiuj dum intima interparolo konfesis: ‘Jes, mi estas kredanto’, aŭ ‘mi ne povas diri, ke mi estas ateisto, kvankam mi ne vizitadas preĝejon’, kaj kredu, pri tiuj homoj mi ne kuraĝus diri, ke ili estas naivuloj. Krome en la vicojn de kredantoj apartenis ankaŭ tiel famaj sciencistoj kiel Ampère, Newton, Lomonosov, Pavlov, Planck kaj aliaj.”

“Sed diru al mi, kiel tiuj homoj povas kredi, ke Dio kreis en kelkaj tagoj la mondon kun homo? Ja, hodiaŭ estas klara al ĉiu mezinteligenta homo, ke kosmo evoluis, evoluas, ke ankaŭ homo evoluis el malpli altaj formoj de vivaj organismoj kaj simile.”

“Hodiaŭ prudenta kredanto akceptas la faman evolu-teorion. Jam sankta Tomaso la Akvinano instruis, ke instruado de la eklezio ne darfus esti en ia kontraŭdiro al scienco. Mem Darwin, kiu estas kreinto de evoluismo, diris, ke lia teorio neniel eliminis la ekziston de Dio.”

“Se kredantoj, kiel vi diras, akceptis evoluismon, do kion poste, laŭ ili kreis Dio?”

“La evoluo subiĝas al certaj leĝoj kaj en tiuj leĝoj la kredantoj vidas la kreadagadon de Dio. Se ni volas studi la ecojn de viva aŭ neviva materio, ni devas penetri en la mikromondon, kie ni jam ne renkontas determinismon, kiu regas en niaj kondiĉoj. Tie ni konstatas veran komplikecon, laike

dirite: ‘spacon por senfina observado kaj esplorado’. La fama sciencisto A. Einstein pri tiaj fenomenoj diras: ‘Scio, ke ekzistas io por ni netrapenetrebla esprimo de la plej profunda racio, akceptebla nur en siaj plej simplaj formoj - tiu ĉi scio kaj sento kreas veran piecon ...’ Kaj kion diras idealismaj filozofoj: ‘Ĉiopova Dio estas absoluta vero, kaj absoluta vero en nia mondo ne estas ekkonebla, tion agnoskas ankaŭ adeptoj de aliaj filozofioj. Tiu ĉi aserto baziĝas sur scienco, ĉar pri nenia scienca hipotezo aŭ eldirita leĝo ni darfus aserti, ke ĝi estas universala, ĉievalida, la lasta. Idealismaj filozofioj do baziĝas ankaŭ sur scienco kaj tial hodiaŭ ĉiu prudenta homo devas rigardi ilin kaj kompreneble ankaŭ la instruon de la religio kiel egalvaloran al ĉiuj aliaj filozofioj. Kiel mi jam diris, surbaze de scienco ni neniam povas pruvi ekziston aŭ neekziston de Dio. Ĉi tie ankaŭ radikas eldiro, kiun mi foje aŭdis: ‘Ateistoj estas kredantoj, kiuj kredas, ke Dio ne ekzistas.’”

“Kredu, ke mi ankoraŭ neniam havis okazon konatiĝi kun religia instruo pli detale kaj kiel mi vidas, ĝi indas atentemon. Ĉu ekzistas ia konvena literaturo?”

“Jes, la konvena literaturo ne nur estas havebla, sed la kredantoj povas konatiĝi kun la bazaj principoj de la kredo ankaŭ en preĝejoj dum predikoj aŭ el la ekleziaj gazetoj aŭ ĵurnaloj. Krome ili facile povas konatiĝi kun aliaj filozofioj, kaj tial ili povas havi pli larĝan superrigardon ol tiuj, kiuj aliĝas nur al unu filozofio kaj alian ili ne havas okazon ekkoni. Mi estas konvinkita, ke multaj nekredantoj, se ili povus ekkoni instruon de religio, ili certe ŝanĝus sian opinion. Estas devo de ĉiu homo pilarlĝigi siajn sciojn kaj konojn. Kiu ne lernas, tiu forgesas kaj pekas kontraŭ Dio.”

Scienco estu por ni ilo por pli bone ekkoni kreaĵon de Dio kaj pere de kreaĵo ĝian Kreinton! ■

*Filia*